EKO 2022 Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA · ILEI · IFEF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler


**ENHAVO n-ro 21>** ● AMO 84 ● Ekzamenoj C2 ● Togo ● Araba kurso ● < apr. 3

## AMO 84 – unua raporto – multfadena seminario

Tra la lastaj du tagoj okazis epokfara AMO-seminario, pro kelkaj kialoj. Ĝi kunigas tri gravegajn fadenojn: ekologion kaj klimatŝanĝon, kunlaboron de du gravaj kaj aktivaj fakaj asocioj: IFEF (fervojistoj) kaj BEMI (biciklistoj), Trie, ĝi okazas pere de la grava projekto VERDEN, kiu ricevas subvenciadon de la programo Erasmus+. Kvara fadeno povus esti la gastiga rolo de la kulturcentro Greziljono. La reta partopreno estis 8 (FR, HR, CZ, HU, IT, AT…) sed feliĉe estis surloka partopreno, kiun mi taksis je ĉ. 20. AMO neniam antaŭe kunfadenigis tian vastan aron da kunlaborantoj!

Post la enkonduko SMG, resumita supre, parolis Francesco Maurelli pri la rolo de la projekto Erasmus, kiu temas pri studentaj interŝanĝoj. Suplemente al tio okazas Erasmus + por aliaĝuloj. La projekto VERDEN celas plenaĝulojn.

Parolis Jaroslav Matuška de la Universitato de Pardubice en Ĉeĥio, kiu partoprenas en la projekto. Li skizis la fakultatojn, projektojn kaj partnerojn de la universitato. Lin sekvis prezento de la studento Matěj Berk, kiu rakontis, kiel li kaj kolegoj volonte partoprenadas la programon VERDEN.




Christine Brucker prelegis forte kaj timige pri la danĝeroj de la tera varmigo laŭ la tezoj de '*Extinction Rebellion*'. Ŝi montris la efikojn de retrokuplaj tendencoj (*feedback loops)* kie serio da faktoroj kunagas por krei ĉiam pli danĝeran ciklan rilaton. Kaj la senrevenajn punktojn, post kiuj savado ne plu eblas. Entute, bonege pretigita prezento.

Sekvis Lars Sözüer, kun la temo 'La efiko de transporto al klimataj ŝanĝoj' Tio elstarigis, kiel funkcias scienca progreso per la allaso de kontraŭaj starpunktoj. Li klare montris, ke la flugtrafiko kreas la grandan plimulton de la transporta problemo. Grandan rolon ludas la enlandaj flugoj en Ĉinio, kiuj okazegas, spite al la brila kresko de la altrapida retaro de fervojoj tra praktike la tuta lando.

La matena programo venis al fino per vigla diskutado ene de la surlokaj parto-prenantoj, kiujn ni foruloj povis vidi. La sesio estas registrata, do estos poste

spektebla de tiuj kun la komputila kapacito por tio. La saĝaj demandoj el la publiko por preskaŭ ĉiu prezentaĵo estis efektive impona.





La posttagmeza programo ekis per la prezento de SMG. Tiu ne bezonos grandan prezenton, ĉar ĝi disiris kun EKO 20. Ĝi aldonis tri novajn partojn, pri bicikloj en trajnoj, komunumaj fervojoj kaj studo pri Hungario.

Fine de la posttagmezo, oni spektis plurajn filmojn de Franco Bressanin (IT) pri daŭripova agrikulturo kaj akvomastrumado. La krome prezentis erojn pri ‚verdaj' fervojetoj – arbaraj fervojetoj, kiuj prokimigas la homojn al la naturo.



Atendata en la dua tago estas prelego de Ladislav Kovář pri la eksteraj kaj internaj kondiĉoj por daŭripova fervojtransporto. EKO jam ricevis la prezentaĵon kaj ni nun alkroĉas ĝin. EKO ricevis ankaŭ skriban tekston en formato *Word* por akompani la lumbildojn. Tio estas ricevebla de EKO kontraŭ peto.




Parolis Boris Mandirola, kiu ekis per kvizo, kaj pluiris skizi la Eŭropajn organojn kiuj influas la ekologian kaj transportan pejzaĝon. Fine, li traktis la efikon de transporton: bedaŭrinde miaj limigtaj kapabloj kapti en la prezentaĵo ekranbildojn. Plie, li parolis pri pasaĝeraj rajtoj en trajnoj – inkluzive pri la minimuma nombro de biciklaj lokoj.

La lasta perezento temis pri interesa projekto uzi Esperanton por kompili informojn el pluraj landoj pri la rajtoj kaj limigoj transporti biciklojn per trajnoj. Tio varias laŭlande, eĉ laŭ regionoj kaj trajntipoj. Tiu servo povus esti tre valora, kaj eĉ inda je traduko al aliaj lingvoj. Plurlingva retejo estas jam planata. Lars pledis por kunlaboro de vera reteja spertulo por helpi en la starigo de moderna retejo por la arigo de informoj.




==================

Per tio ni venis al la fino de ĉi tiu grava seminario. Elstara konstato estis la amikema kaj pozitiva etoso inter la fizikaj ĉeestantoj kaj la reala aligo de ekologiemaj esperantistoj sub la ŝildo de VERDEN kaj AMO.

Raportis SMG.

## La Akademio kunlaboras kun la ekzameno, nivelo C2

Per granda plimulto de la voĉoj, la Akademio de Esperanto ĵus akceptis partnerecon kun UEA pri KER-ekzamenoj, nome:

- ·Agnosko kaj funkciigo de la KER-ekzamenoj, interalie en ilia nova reta formo,
- ·Validigo de la ekzamensistemo kaj lingva kontrolado de la C2-nivela ekzameno.

Al ĉiu el la kvar iom pli detalaj demandoj, pli ol 75% el la tuta 45-membra Akademio respondis "jes". Nun la KER-ekzamen-komisionoj de UEA kaj de la Akademio oficiale kunlaboros por prepari la venontajn ekzamensesiojn, en junio, aŭgusto kaj novembro, interalie en la UK.

Koncizigita el gazetara komuniko de UEA.

## Filmo el Togolando

La togolanda esperantisto Koufionou Koffitche parolas en tiu ĉi filmeto pri la situacio en Togolando, el la vidpunktoj socia, ekonomia, politika kaj turisma. Li prezentas la kredon de togolandanoj pri voduo, la meznombran salajron en Togolando, la (ne)ekziston de nacia senpaga sanservo, la lernejan sistemon ŝtatan kaj privatan kaj la situacion de oficiala kaj efektive uzataj lingvoj, sed li ne parolas pri la togolanda Esperanto-movado.

https://youtu.be/hUJ-Y40ZHHQ

## Nova kurso en la araba

Kurso en la araba por komencantoj gvidata de Taled Orabi.
Tempo: Ekde la 2-a de aprilo 2022, je la 21,00 – 22,00 laŭ la Universala Tempo (UTC); ĉiu-sabate, 16 sesioj.
https://us02web.zoom.us/j/87012145483; Kunven-numero: 870 1214 5483
Pasvorto: La nomo de nia lingvo, tutmajuskle. Eblas aliĝi post la komenco de la kurso.

## Penny Vos instruas oceanie kaj plie

Laŭ informo sendita al la instruista gugla retgrupo <e-ins> de Alessandra Madella.

https://www.youtube.com/watch?v=IAIL2rkyC_c

https://www.youtube.com/watch?v=XjPHG743s-E&t=307s

## Perfektigu vin pri afrika kulturo!

Afrika Centro Esperantista (ACE) organizas perfektigan kurson por la tuta mondo. La kurso baziĝas sur la libro ESPERANTUJISMO. Aliaj libroj utilaj al la kurso estas:

- PRENU PLU
- AFERO DE ESPERO SUB LA LUPEO DE AFRIKA ESPERANTISTO

Do, entute tri libroj estas je dispono de la interesiĝantoj. Ĉiu lernanto siahejme legas la tekstojn kaj respondos demandojn. La tekstoj temas pri Afriko. La kursanoj do lernos pri afrikaj esperantistoj per Esperanto. Estas la okazo por afrikanoj enprofundiĝi en la afrika Esperanto-movado, kaj ŝanco por eksterafrikaj esperantistoj

funde konatiĝi kun Afriko en la Esperanto-movado kaj la Esperanto-movado en Afriko.

Por partopreni la kurson oni devas pagi. La monon oni donu antaŭ ol komenci la kurson. La lernokotizo estas 50 eŭroj. Dum la kurso oni povos gustumi kio estas afrika kuntrejnado (SMG proponas: trejnflegado) (*Coaching africain*).

Interesiĝantoj pri la kurso rilatu kun:
ACE (Afrika Centro Esperantista), 11 BP 48, Lome 11, Togolando

-Telefone: (+228 90281626 / 99449464)
- Rete: afrikacentro@hotmail.com, ace2006hb@gmail.com

## Finnaj instruistoj kunvene – eksteraj rilatoj!

Dekkvino da pensiulaj geinstruistoj atenteme aŭskultis 45-minutan prelegon de ege konata finna instruisto, Saliko, pri tio, kion Esperanto donas kaj kiel ĝi utilas al esperantistoj tutmonde. Ŝi inkludigis kelkajn el la ideoj, kiujn ŝi aŭdis dum la Vintraj Tagoj de EAF en marto 2022 kaj en oktobro-novembro en Japanio en 2007. Ŝi rakontis pri sia gastado ĉe japanaj esperantistoj montrante fotojn pri la pejzaĝoj, temploj, naturo, kulturo kaj kutimoj, kun kiuj ŝi kun sia edzo konatiĝis. Plie, ŝi iom parolis pri JEI kaj ĝia domo en Jacugate. Sekvis pluraj demandoj de la aŭskultantoj, kiuj petis Salikon sciigi ilin pri la lingvo de Zamenhof. Saliko dankas siajn gastigantojn kaj kunlaborantojn en Japanio kaj en Finnlando.

## Plia germana kurso

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo:

Nomo: Esperanta kafejo: Poliglota klubo
Gvidantonomo: Gregorio
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Bad Lauterberg, Germanio
Aldoninto: GKJ

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27412

========= vortoj: 1190 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2021 (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto